

Nia feria migrado en Alpoj, 4-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 624, 1975.09.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por plilongigi la someran periodon ni invitas vin ferii kun ni, daŭrigante raporton pri migrado okazinta en Berna Oberlando.

A.- Temas pri la dua migrado en la svisa montaro, kiun organizis Svisa Esperanto-Junularo. Partoprenis la aranĝon 11 gemarŝemuloj el Svislando, Francio kaj Hungario. Jen priskribo de la dua migradtago.

Cl.- La unua tranoktado okazis en dormejo de la naturamika domo Reutspierre je 1270 metroj de alteco. La vetero estis tiel bela kaj varma, ke la kovrilojn ni ne bezonis, io ne ofta en la montaro. Abunda matenmanĝo permesis al ĉiuj akiri forton por la tuta tago.

A.-Je la sepa matene ni estis pretaj por la ekiro. Ni laŭiris la valon formante diskutgrupetojn. Unu el ili arigis la botanikemulojn. Ili komparis siajn konojn pri la floroj. La franca lingvo estis ilia nomenklatura idiomo, ĉar neniu emis kunporti la PIV-vortaron en sia dorsosako. Sed tamen ili ne krokodilis.

Cl.- Nia vojo, post traŭro de la rivero, komencis serpentume alsupri. Ĝi kondukis nin en alpejon, kies nomo estas *Kaltenbrunnen* (Malvarmaj fontoj). Tie ni povis konstati, kiel modernigis la kamparana vivo eĉ en domaroj situantaj je 1600 metroj de alteco. Per melkmaŝinoj la bovinoj estas senlaktigitaj, kaj la rikoltita lakto fluadas ĝis la valo per tubo.

A.- Pluraj migrantoj aĉetis bovlon da ĵus melkita lakto, kaj la svisgermanoj provis paroli kun la kamparanoj. Ili informigis pri la vojo, kiu estas malbone indikita. Antaŭe, kiam la brutgardistoj iradis piede de alpejo al alia, la padojn oni regule prizorgis. Sed nun, kiel la urbanoj, la montanoj veturas aŭtomobile. Por tio ilia zorgo estas por la vojoj venantaj el la valo. Kaj la montpadoj iom post iom malaperas. Sur la alpejo *Kaltenbrunnen*, kie ni troviĝis, la padindikilo sciigis, ke la vojo, kiun ni intencis sekvi, estis detruita. Ni nin demandis, kial tiun ĉi informon oni ne ricevas en la valo? Ni ne havis la kuraĝon realvali por sekvi alian vojon, kaj ni decidis tamen antaŭeniri.

Cl.- Post alsuprado en herbejo ni baldaŭ atingis la detruitan pad-eron. Lavango ĝin fortranĉis dum la vintra sezono. La plej lertaj el ni facile transiris tiun ĉi malfacilan kaj tre glitan krutejon. Sed kiuj ne kutimis ekskursi en la montoj, tiuj timis fali. La gvidanto Maŭrico elsakigis sian montŝnuron kaj ilin kunŝnuris. Per sia montopioĉo li fosis ŝtupojn. El la supro ni rigardis ilin tre malrapide antaŭenveni.

A.- Tiuj perditaj lokoj, kie la brutoj ne paŝtigas, fariĝas florplenaj. Ĉirkaŭ ni abundis alpajn plantojn, kaj vi povas imagi, ke la botanikemuloj ne silentis. Ilona, la budapeŝta studentino, notis la nomojn de la floroj renkontitaj. Fine de la migrado ŝia notlibro listigis pli ol 60 flornomojn en la franca, kun aldona ofte la tradukoj en la germana kaj esperanto.

Cl.- Aliaj migrantoj fotadis. Ni ĉiuj admiris la montojn kaj la glacerojn. Vidalvide staradis la rokaj pintoj de la montaro *Engelhörner* (pintoj de la anĝeloj), kaj la sovaĝa kaj impresiga *Weterhorn* (la pinto de la vetero). Kaj inter ambaŭ montoj fluadis la glaĉero de *Rosenloui*. La

plej altaj suproj de tiu regiono atingas 3700 metrojn de alteco. Ni mem ripozis je 2200 metroj de alteco, ĵus sub monto nomata *Tschingel*.

A.- Kiam alvenis la kunŝnuritoj, ni daŭrigis la paŭzon. Ni malfermis la sakojn kaj manĝetis. Ni sciis, ke la vojo estas longa, sed ni troviĝis en tiel bela loko, ke ni ŝatis daŭrigi la paŭzon. Sed ĉio havas finon. *Ĉu ni ek-al-u?* proponis Maŭrico, kiu sciis, ke ankoraŭ pli ol 7 horoj de marŝado estis antaŭ ni. Ĉiuj stariĝis, kaj la ekskursado rekomenciĝis. Dum la tuta tago ni laŭiris montflankon ofte sufiĉe krutan, kaj antaŭ niaj okuloj iom post iom aliĝis la panoramo. La pintoj de la anĝeloj kaj la glaĉero Rosenloui forgesiĝis profite al admirado de novaj suproj kaj novaj glaĉeroj : Schreckhorn (la pinto de la timo), Eiger (la orgro), Jungraŭ (la virgulino), kiuj atingas pli ol 4000 metrojn de alteco.

Cl.- Nelacigeble ni marŝadis, trairante alpejojn, kies nomoj ne estas tre poeziaj : *Ober Stafel*, *Ober Läger* (altaj ŝtaloj, altaj restadejoj), kaj ni vidis multajn porkojn rozajn aŭ nigrajn, bovinojn brunajn, ŝafojn kaj kaprinojn. Kelkaj vidis ĉamojn. Jam ekvesperis, kiam ni atingis la pasejon *Grosse Scheidegg* (la granda dispartigo de al akvoj). Tie ni longe ripozis, piknikante kaj fintrinkante nian terezervon. Kaj ĝis la spea kaj duono ni daŭrigis la marŝadon.

A.- Ni alvenis en montara hoteleto, bela ĉaledo kun vasta ligna teraso, nomata *Waldspitz* (pinto de la arbaro). Ĝi fakte troviĝis ĉe la limo de la arbaro je 1900 metroj de alteco super *Grindelwald* kaj vidalvide de la famaj *Eiger*, *Mönsch* kaj *Jungfrau*.

Cl.- Ĉe la fontano ni lavis nin, kaj longe ni admiris la sunsubire rozkolorigitajn montsuprojn. Kaj poste, je la lumo de petrollampoj ni bankedis kaj aŭskultis rememorojn de Alberto, iama legia soldato kaj Cosette, kiu civil-servis en Alĝerio.

A.- La venontan semajnon ni raportos pri la aliaj migradtagoj

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !